

Région Languedoc-Roussillon

# SUBSTANTIA STILO

\*\*\*\*\*  
Bulletin Trimestriel - Trimonata Bulteno  
Esperanto-Federacio de Langvedoko-Rusiljono  
CCP/Pck 936-28P Montpellier Jarabono/Abonnement:25F  
N° 112 1a Kvaronjaro = 1er trimestre 90

UNE AUTRE IDÉE DE LA COMMUNICATION



UNE HAUTE IDÉE DE LA COMMUNICATION

## Regain d'intérêt pour l'Espéranto.

INDUBITABLEMENT la langue internationale connaît soudain un regain d'intérêt : dossier de 8 pages dans "L'Ecole Libératrice", organe du Syndicat National des Instituteurs en Janvier, article dans "Le Monde" peu après puis dans la revue "Grands Reportages", etc. Il est vrai qu'une échéance capitale pour l'Europe en pleine mutation se profile (moins de 1000 jours). Il n'est pas trop tard pour réagir... Il est temps d'agir !



### NOTRE DOSSIER PÉDAGOGIQUE: ESPÉRANTO: CELUI QUI ESPÈRE

Une langue créée à la fin du 19<sup>e</sup> siècle par Zamenhof, pour favoriser la compréhension entre les peuples et supprimer les conflits, pensait-il. Une grammaire réduite, une construction rationnelle. Une « bibliothèque » extraordinaire, plus de dix-mille ouvrages traduits ! Une langue qui permet l'échange direct, sans traducteur. Et qui s'enseigne !

Lire en pages 13 à 20

... Le Monde • Jeudi 15 février 1990

## Les Verts votent pour l'espéranto

Lors de leur assemblée générale à Marseille, en novembre 1989, les Verts ont adopté une motion proposant l'utilisation de l'espéranto comme langue de travail dans leurs relations avec les partis écologistes étrangers. Cette décision veut répondre aux « problèmes linguistiques qui se posent aux Verts au sein du Parlement européen ainsi qu'au développement des mouvements écologistes dans le monde ». Elle concrétise également un travail de collaboration et les associations d'espéranto, telle que la Fédération Française de l'Espéranto de M. Mermet (1) Antoine W. général des Verts positivement.

... pour les dernières élections européennes de 1989, en faveur de la langue internationale, en répondant à un questionnaire envoyé par l'UFE (2), aux six dirigeants des partis politiques français. Le prochain congrès européen des Verts se tiendra à Budapest à l'automne 1990 et l'espéranto sera l'une des langues de travail.

L'espéranto, fondé en 1887 par un médecin polonais, Louis Zamenhof, est une langue internationale.

députés européens a signé une motion en faveur de l'utilisation de l'espéranto comme langue de travail en sus des huit langues officielles des instances de la CEE.

En Europe orientale, où l'espéranto fut longtemps le seul moyen permettant des contacts pour voyager en Occident, les utilisateurs de cette langue sont beaucoup plus nombreux qu'à l'Ouest et très actifs avec les

et l'espéranto. Ce dernier sera également utilisé, avec le français et l'anglais, lors des premières « Assises mondialistes » qui se tiendra du 24 au 28 avril à Tours sur le thème du « Monde en devenir ». La question d'une langue de communication mondiale y sera exposée. Des mouvements humanitaires d'une vingtaine de pays seront présents.

### ESPERE EN TOUT...

C'est une langue qui fait son chemin : d'après le Quid, seule source fournie par eux-mêmes, on compterait environ 3 millions d'espérantophones dans le monde. Du haut de son nuage, le docteur Zamenhof va être content. C'est lui qui, en 1887 à Varsovie, posa les bases de ce qu'il appela d'abord « langue internationale ». Les fort nombreuses tentatives au cours de l'histoire s'étant soldées par des échecs, elle reste le seul exemple réussi de langue artificielle.

Tres proche de l'italien, par ses sonorités, et d'une grande simplicité de construction, l'espéranto s'apprend très, très vite : environ dix fois plus vite que l'anglais. La grammaire est réduite par l'absence d'irrégularités et les racines sont aisées à comprendre d'un bout à l'autre de la planète, en

raison de leur caractère international. Exemple : tous les mots autour de « aider » sont construits avec la racine *help*. Pour autant, ce n'est pas une langue au rabais : 30 000 œuvres de la littérature internationale ont été traduites sans problème, et des auteurs de diverses nationalités écrivent en espéranto. Quel intérêt pour vous ? La diaspora espérantiste étant très active dans le monde entier, il est plus facile de pénétrer la vie locale dans une petite ville aux antipodes ou ailleurs, passes les bars d'hôtels et les milieux d'affaires. A condition d'avoir en poche l'annuaire de l'Association universelle qui vous donne les adresses. Attention ! il est lourd ! Union Française Esperanto : 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris. Tél. : (1) 42.78.68.36.

### BRIGITTE CAMUS-LAZARO


(1) « Ecologie-espéranto », 38, rue an-Moulin, 31220 Ste-Foy-la-Grande. t. : 57-46-47-28. AVUE, Jean-Luc ermet, 71340 St-Donnet-de-Cray.

(2) Union française pour l'Espanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris. Tél. : 42-78-68-86.

«grands Reportages» de Mars 90

R. JANTON à ALES les 5 et 6 MAI





La Urbo ALES kaj la tiea esperantista grupo "La verda stelo" atendas vin je la 5a kaj 6a de Majo 1990. De preskaŭ 20 jaroj ni ne kongresis tie !

Kelkaj malhelpoj (ekzemple la poŝtista striko) malebligas anonci la definitivan programon. Tamen ĝi estas grandlinie konata, malgraŭ kelkaj ŝanĝoj kaj vi pardonos lastminutajn modifojn.

Kiel anoncite sur la frontpaĝo, Profesoro Pierre Janton prelegos dufoje, sabaton en la franca kaj dimanĉon en esperanto. Tiu programero certe

sufiĉos por venigi vin al Alès. Ankaŭ la grupoj de la federacio prezentos diversajn programerojn kaj kalkulas je via ĉeesto kaj subteno. Laste ni tagmanĝos dimanĉe en pitoreska loko, taŭga por vojaĝemaj Esperantistoj, en la restoracio de la bambuejo de Anduze. Post la tagmanĝo eblos viziti la bambuejon; eĉ se vi konas ĝin, nova vizito valoras, ĉar ĝi aspektas ĉiam alia, laŭ la sezono. Se vi ne povas ĉeesti la tutan kongreson, kial ne kuniĝi al tiu tagmanĝo kun viaj familianoj ?

x) Sed atentu, ke por la bona organizado de la kongreso, nepras rezervi vian hotelĉambron (pro la longa semajnfino, certe estos pli da turistoj ol kutime) kaj la dimanĉan tagmanĝon. Anticipan dankon kaj ĝis baldaŭ en Alès!

La prezidanto, Jean Hénin

PROGRAMO: Sabaton, la 5an de Majo \*\*\*\*\*

Je la 15a malfermo de la kongresejo, ekspozicio kaj libroservo. Adreso de la kongresejo: RUE PASTEUR, apud la urbdomo

Je la 16a, la grupo de Alès prezentos sin kaj junulcentron, kie E° estas, Poste, retrospektiva projekciado pri la lastaj Universalaj (instruata. kongresoj (S-ino Payret el Perpignan)

Je la 17a, Anna, juna Polino el Wrocław prezentos sian urbon.

La ĉeesto kaj partopreno de Germano el Orienta Berlino estas ankaŭ esperata.

Je la 18a, Profesoro P. Janton prelegos franclingve pri la temo: "Komuna lingvo por la domo 'Eŭropo'" kaj respondos eventualajn demandojn.

Poste vespermanĝo en proksima memserva restoracio (apud la subprefektejo)

Je la 21a, daŭrigo de la programo: teatraĵetoj, deklamaĵo, iom da muziko kaj lumbildoj pri Sardinio (temas nek pri sardeloj nek pri "sardana" danco)

Dimanĉon, la 6an de Majo

Je la 9a horo tre precize: federacia kunveno. Kiel vi legos en la financa bilanco, ni ricevis ampleksan subvencion de la regiona konsilantaro kaj ni devos fari gravajn decidojn. Pri projektoj anticipe informu la sekretariojn. Je la 11a: Prelego en E° de P. Janton: "internacieco de esperanto"

Je la 13a en la restoracio de la bambuejo de Anduze: tagmanĝo kaj poste promenado en tiu paradiza loko

Ĉiuj lokoj de la kongreso taŭgas por rulseĝoj (kongresejo, restoracioj, bambuejo)

\*\*\*\*\*

Praktikaj informoj:

Alès estas facile atingebla per aŭtomobilo (distancoj de Montpellier: 70 km, Nîmes: 45);

fervojaj rilatoj kun Nîmes: sabate: Nîmes: 15h11 / Alès: 15h53 (Bv. kontroli!)

dimanĉe: Alès: 17h04 / Nîmes: 17h40 / Montpellier: 18h12

ankaŭ aŭtobusaj rilatoj kun Nîmes kaj Montpellier:

sabate: Nîmes: 13h00 - Alès: 14h00

Montpellier: 11h30 - Alès: 13h05 (aŭ 16h15 - 18h00)

dimanĉe: (neniu por Nîmes - vidu "per trajno" same por Montpellier)

buso

Ni dispartigis la taskojn jene:

koncerne la loĝadon en Alès: kontaktu la sekretariojn de la grupo,  
Sron E. Bolla: 7, Avenue Gibertine 30100 Alès  
Telefon-numero: 66-56-82-76

por aliĝi kaj rezervi la dimanĉan tagmanĝon: kontaktu J. Hénin  
Rte de Montcayroux 48500 La Canourgue  
(Tel-n°: 66-32-86-36)

pri la ĝenerala kunveno kaj la federaciaj aferoj, kontaktu la sekretariojn,  
C. Gérard, 4 Rue Docteur Rives 66000 Perpignan  
(Tel-N°: 68-55-51-77)

Se vi skribas kaj deziras respondon, ne forgesu kunsendi afrankitan koverton.

Pri loĝado, tagmanĝo en Anduze, legu la paĝon 4an.

NE FORGESU ALIĜI ! (kotizo: 25 F)

Ni devas lui salonojn, venigi preleganton, ktp.



**URĜAS**

A L I G I L O kaj mendo de la dimanĉa tagmanĝo  
sendotaj al J.Hénin 48500 La Canourgue

Nomo kaj adreso:

-aliĝas al la federacia kongreso en Alès : 25 F x ..personoj=  
(senpage por gejunuloj kaj eksterlandanoj)

-mendas la dimanĉan tagmanĝon : 60 F x ..personoj=

-----  
Sumo :

-sendas ĉekon de .... F je la nomo de:  
Fédération d'Esperanto du Languedoc-Roussillon  
pĉk 956-28P Montpellier

(adhésion au congrès:25F par personne,gratuit pour jeunes et étrangers  
-repas :60 F " " (à commander avant le 28 Avril à J. Hénin)  
règlement joint par chèque -voir ci-dessus)

A L E S : loĝado

Ne mankas hoteloj en tiu urbo kaj apude;tamen ni rekomendas du el ili,pro ilia proksi-  
-meco de la stacidomo kaj de la kongresejo,ankaŭ pro la moderaj prezoj:  
Hôtel Durand\* 3,Boulevard Anatole France Tel 66 86 28 94,16 ĉambroj ĉiuj kun duŝo kaj  
necesejo; Prezoj:unupersona ĉambro:85F dupersona ĉ:inter 100 kaj 140F (matenmanĝo 18F)  
Hôtel de Flore,23 Boulevard Victor Hugo,Tel 66 30 09 84,20 ĉambroj (du kun duŝo kaj nec.)  
taŭgas por rulseĝoj.unupersona ĉambro:80 F -dupersona ĉ.:inter 80 kaj 120F

-----  
(Teoria) ebleco loĝi en La Grand Combe (je 15km norde),en sporta centro:35F en 2persona ĉ.

-----  
Tendumi ne eblos en Alès sed je 7km norde en Cendras:  
-Camp du Clos de l'Abbaye\*\*  
-La Croix Clémentine\*\*\*\*

Manĝoj: sabaton:en memserva restoracio,apud la subprefektejo,je kelkaj mn piede de la kongresejo

-----  
dimanĉon:je la 13a h  
menuo je 60F,nur se vi rezervigas antaŭ la 28a de Aprilo  
(crudités,cuisse de volaille forestière,légumes,dessert,<sup>1</sup>/<sub>4</sub> vin)

# Financa Raporto

Je la 31a de Decembro<sup>33</sup> la Federacio posedis:

<u>Enspezoj dum 1989:</u>	5043,49 F	<u>Elspezoj:</u>	
	+		
Sudfrancia Stelo	2850	Sudfrancia Stelo	2877,52 F
UFE (parto de la kotizoj)	763	Libroservo(antaŭpago)	1067,50
Libroservo (repago)	760	Grupo de Béziers	300
Sparkaso	231	Novaj statutoj	156
Subvencio de la regiona konsilantaro	25000	Sekretario	154
		Pĉk	5
	-----		-----
Sume	34647,49 F		4560,02 F

Diferenco: 30087,47F

Je la fino de Decembro 1989,la federacio posedis:

sur la poŝtĉekkonto 703,47 F  
ĉe la sparkaso 29384 F  
Entute 30087,47 F

La kasistino: L. Négron.

\*\*\*\*\*



# Tra la federacio.

11. En Lézignan-Corbères daŭre funkcias la nova kurso de Sro Bénazet en la kolegio J. Anglade kun 9 entuziasmaj gelernantoj.

## Lumbildoj pri Carcassonne...en Bulgario

Lastjare Sro. Georgo Kutsera kaj lia edzino partoprenis en la "Internacia semajno de Sète" kaj poste vizitis la "Civiton" de Carcassonne. Pro foresto de Sro Borque, kiu estis tiam en Hispanio, Sro Benit el Villegly havis la plezuron akcepti ilin kaj okupiĝis pri ili dum tuta tago, vizitigante la urbon kaj ĝian fortikaĵon. Li ricevis poste dank-leteron de Ges. Kutsera, kiuj sciigis, ke dum klubvespero ili prezentos diapozitivojn pri Carcassonne.

\*\*\*\*\*

En Narbonne Esperantistoj denove aktivis. Ni jam renkontis kelkajn el ili dum niaj federaciaj kunvenoj. Aldoniĝis Sro Picou, instruisto en la Pariza regiono (vi legos aparte en tiu-ĉi bulteno lian planon por uzi la internacian lingvon), kiu devenas de la Narbona regiono kaj intencas tie agadi por esperanto. Li jam kontaktis plurajn esperantistojn.

\*\*\*\*\*

## Forpasis amiko:

Fine de Februaro mortis en Carcassonne Pierre Régner.

Ekshorloĝisto en Quillan, li estis tie tre bone konata. Pro malbona sano, li ne povis partopreni esperanto-aranĝojn dum siaj lastaj jaroj. Ni vidis lin lastfoje dum la nacia kongreso de Perpignan. Li daŭre agadis por esperanto kaj ĉiam interesiĝis pri la movado. Li estis afabla persono kun facila amika kontakto. Ni bedaŭros lin. Al liaj familianoj ni sendis niajn sincerajn kondolencojn.

\*\*\*\*\*

30

Se ne venis multaj informoj pri tiu departemento en la lastaj monatoj, nun estas la malo.

En Alès la grupo denove aktivis kaj kalkulas je via vizito en Majo. Lumaj reklam-paneloj informas pri esperanto. Espereble la ekspozicio dum la federacia kongreso ebligos varbi kelkajn novajn homojn.

En Nîmes kaj apude aktivis S-ino Gaussen, kiun ni devas gratuli, pro la multegaj klopodoj... kaj sukcesoj. Ankaŭ pro la informoj regule senditaj.

Post la apero en "L'Ecole Libératrice" de 8paĝa dosiero pri E°, preskaŭ 5000 prospektoj estis disdonitaj (al geinstruistoj speciale) kun la helpo de FEN kaj SNI. Ankaŭ 700 broŝuroj estis disdonitaj al la 17 kolegioj de Nîmes kaj 3 liceoj. Klubo jam funkcias en la kolegio J. Verne kun S-ino Boutin, kiu instruas tie. Venontjare alia E°-klubo estas planata en la kolegio J. Vallès. Klubo kun 12 gejunuloj kaj 5 plenkreskuloj funkcias sub la respondeco de la asocio de gepatroj de gelernantoj kaj "Foyers Ruraux".

Ni jam menciis la restoracion "Royaldine", kiu anoncas en diversaj lingvoj, inter kiuj esperanto.

Sekve de prelego de Sro Dumas en la "Domo de Eŭropo", "Radio Typ", FM 105,6 khz, petis prezenton de E° kaj nun regula elsendo pri E° okazas ĉiun unuan sabaton de la monato de 10h $\frac{1}{2}$  ĝis 11h. Se vi deziras anonci ion, skribu al la radio-stacio Vieille Route d'Uzès/Nîmes aŭ al S-ino R. Gaussen, Rue de la Galinière, 30730 St Mamert.


En la "Domo de Eŭropo" nun funkcias du kursoj:

-lundne: unuagrada kurso (17h-18h30)

-marde: konversacia rondo (15h-17h)

6 geesperantistoj de Nîmes baldaŭ vizitos Belgion. Ili estas invititaj de la grupo de Gand kaj vizitos tie plurajn grupojn, prezentos lumbildojn pri sia urbo kaj ankaŭ vidos internacian flor-ekspozicion.

Kiel en Alès, lumaj reklam-paneloj anoncis (dum 3 semajnoj) esperanto-kursojn.



Kaj, ĉar feliĉo ne venas sola, ni devas daŭrigi pri 30.  
 S-ino Gaussen (denove ŝi!) prelegis en Uzès, en la kadro de la "popola Universitato".  
 Deko da junaj homoj enskribiĝis por kursoj, ĉu por perkoresponda kurso, ĉu por kurso  
 gvidata de F-ino Bony.  
 Kaj fine eble la plej interesa informo. 9jara lernantino de S-ino Gaussen (denove ŝi)  
 skribis al FR3 pri la programo "ne estas juste", kie gejunuloj pledas por iu kaŭzo.  
 Sia propono estas akceptita kaj ni povas anonci, ke la elsendo okazos

**Grave** → JAUDON, la 19an de APRILO je la 18a horo.

Nepre aŭskultu sed ankaŭ sciigu al la program-respondeculoj, ke vi aprobas ilian  
 decidon. Se vi ne kuraĝas skribi leteron, uzu la minitelon 36-15 FR3.

34

**Invitoj** {

BEZIERS: Venontaj kunvenoj:

- sabaton, la 28an de Aprilo (je 14h30 en Caserne St Jacques)
- dimanĉon, la 20an de Majo. Tiun tagon ni EKSURSOS per privataj veturiloj  
 al Elne, le Boulou, Céret kaj manĝos en RESTORACIO. Kompreneble esperan-  
 -tistoj de aliaj grupoj aŭ izolitaj, ankaŭ ne-esperantistoj, povas partopreni  
 kaj estas kore invitataj.
- dimanĉon, la 24an de Junio la grupo denove EKSURSOS al MONDHEJMO.  
 "Mondhejmo" troviĝas en Caùduro, sur la vojo RN 112, je 12 Km post St Chinian,  
 maldekstren. Tie ni povos konstati la progresojn de tiu centro por ekolo-  
 -giistoj kaj esperantistoj kaj kune PIKNIKOS. La invito validas por ĉiuj  
 esperantistoj kaj interesitaj personoj. Venu kaj ĝuu la bonan kamparan aeron!  
 Kontaktadreso: 9, Rue G. Picot 34500 Béziers (Tel. 67 31 13 18)

\*\*\*\*\*

MONTPELLIER: Venontaj kunvenoj

- merkredon, la 2an de Majo
- merkredon, la 6an de Junio

**Invito** {

Kiel ĉiujare, Ges. Diez invitas al renkontiĝo en siaj ĝardenoj, sabaton  
la 23an de Junio, ekde la 17a horo. Adreso: Villa Colombe, 514, Rue de  
 l'Aiguelongue. *Ciu estas bonvena!*

\*\*\*\*\*

Sudfrancia perkoresponda kurso:

*Ĝi daŭre kreskas. Nun entute 430 aliĝintoj, inter kiuj 260 Afrikanoj (125 el Togolan-  
 -do). Menciinde, ke aliĝis tuta grupo el Angolo (ĉu la unuaj esperantistoj tie?) kun  
 instruisto pri la franca lingvo.*

*SPK kompreneble bezonas vian helpon. Kiel jam anoncite, SPK vendas kovertojn kun  
 stampitaj poŝtmarkoj el la landoj de la gelernantoj de SPK. (15 FF = 100 poŝtmarkoj)  
 SPK ankaŭ akceptos kun dankego nestampitajn aŭ stampitajn poŝtmarkojn. La afrikaj  
 gelernantoj ne povas sendi respondkuponojn kaj tial subteno de SPK estas necesa.  
 Nuna adreso: Esperanto ĉe C. Cayzac B.P. 7073 34022 Montpellier Cedex. Antaŭpago dankon!*

**X**  
48

Du anglaj gejunuloj anoncis sian viziton en Julio ("Pasporta Servo").  
 Ambaŭ estas respondeculoj de la Brita E°-junulara asocio kaj volonte vizitus aliajn  
 lokojn de la regiono. J. Hénin atendas proponojn.  
 Isabelle H. redaktas nun memuaron pri E° kaj la eŭropa problemo, kiun ŝi devos "defendi"  
 kontraŭ sia universitata profesoro (en la angla) kaj la samkursanoj.  
 En Millau, du novaj geesperantistoj "kunvenas" ĉiusemajne por perfektigi en E°. Eble 3a  
 baldaŭ kuniĝos.

66

\*\*\*\*\*  
 Nova asocio : Asociació Amics de l'Esperanto (Sidejo: 72, Av. Gral. De Gaulle 66000)  
 Ĝia celo estas disvastigi E-on per la kataluna lingvo. De Februaro ĝis la fino de Marto  
 loka kataluna radio-stacio elsendis ĉiulunde novaĵojn pri E° kaj krome E°-kantojn kaj  
 iom da gramatiko.  
 La asocio eldonis E°-broŝuron, kiu entenas 1500 E°-vortojn kaj la gramatikon. Ĝi nomiĝas:  
 "L'Esperanto en 24 paĝines" kaj la prezo estas 10 FF.

\*\*\*\*\*  
 Lastminute : Ni ekscias pri la morto de la patro de Jean Amoureux.  
 Al Jean, liaj edzino kaj familianoj ni esprimas nian malĝojan simpatian.



\*\*\*\*\*

**Notu:** }

UFE planas prelegvojaĝon de Sro Povilas JEGOROVAS el Litovio  
 inter la 9a de Majo kaj la 7a de Junio. Lia turneo finiĝos en Blois  
 en la Nacia Kongreso. Informiĝu pri eventuala vizito al via grupo.

# Internaciaj Semajnoj

## ĉe mediteranea kaj ĉe Alpoj



La Kultura Centro de Montpellier proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esperanto

- ĉu en montara ripoza loko, kadre de agrabla familia domo de la 25a de Aŭgusto ĝis la 1a de Septembro,
- ĉu en la havenurbo Sète, apud ripoza parko de pluraj hektaroj ĉe Mediteranea bordo, dum ideala periodo pro la bona vetero sed ekstere de la somera troa-homamaso de la 15a de Septembro ĝis la 22a.
- ĉu en ambaŭ lokoj.

En Habère-Poche aŭ en Sète vi trovos plurnivelajn kursojn, belajn vesperkunvenojn, ekskursojn kaj... bonan manĝaĵon  
 Aliĝo: 200F antaŭ la 1a de Junio (270 F poste)  
 Loĝado kaj manĝoj:

Habère-Poche: 889F (duperzona ĉambro)  
 1078F (unu-persona ĉambro)

Sète: 1183F (duperzona ĉ), 1330F (unupersona ĉ.)

Ambaŭ lokoj taŭgas al rulseĝoj. Ebleco tendumi apude.

Limdato de antaŭmendo de ĉambro: la 15a de Julio

Aliĝoj, informoj, klarigoj: ESPERANTO

5, Rue du Docteur Roux

F34000 MONTPELLIER





# Alvoko por la nacia Kongreso



Kiel jam anoncite en la lasta SFS, la venonta nacia kongreso okazos en Blois, EN la kastelo mem! Prelegos G. Maertens, estrarano de UEA pri "Esperanto kaj Eŭropo", Maire Mullarney, irlandano pri "frua edukado". Ceestos eksterlandanoj el pluraj landoj, ĉar okazos kunsido de la Eŭropa Esperanto Unio. La regiono mem ne bezonas specialan reklamon. La urbestro de la kongresurbo estas... la ministro pri kulturo Jack Lang! Bona okazo por montri al niaj registaraj instancoj, ke E<sup>o</sup> ja havas kulturon kaj ke ni estas konsiderinda nombro. Tio estos evidenta nur se multnombraj esperantistoj partoprenos. Se estos nur manpleno da homoj, ni aspektos ridindaj, kaj esperanto definitive restos "amuzaĵo" en la dosieroj de la ministerio pri kulturo. Esperantistoj ne rajtas maltrafi tiun okazon.

NACIA KONGRESO = JE PENTEKOSTO (komence de Junio)

## Anekdotoj

**SNCF - C'EST POSSIBLE...**

Mais il y a des cheminots qui n'en savent rien! C'est ce que pourrait penser un Berlinois, M. Wilhelm Luttermann, qui a écrit en espéranto à la gare de Narbonne pour demander le remboursement d'un titre de transport non utilisé. Comme personne n'a pu traduire sa lettre, celle-ci a été transmise à un établissement d'enseignement privé de Montpellier qui, bien qu'agréé pour la traduction en diverses langues, et malgré la compréhension partielle de la lettre, a avoué son incompetence pour l'espéranto.

**A CAP d'AGDE, c'est IMPOSSIBLE...**

...de comprendre

Vous connaissez certainement les installations modernes de cette station dont un palais des congrès avec possibilités de traduction simultanée. Voici un écriteau qui se trouve à proximité de ce palais, à l'entrée d'un parking, pardon un parc à voitures. Cela ressemble à de l'anglais; si vous réussissez à traduire le texte, veuillez envoyer la solution à SFS. "accès whitters only to entry propriétaires of parkings place".  
Nota: cela se trouve à Cap d'Agde et non pas à Pretoria.

**COMITÉ D'ORGANISATION DES PREMIÈRES ASSISES MONDIALISTES**

**"LE MONDE EN DEVENIR"**

BOITE POSTALE 0631, 37006 TOURS CEDEX (FRANCE)

**KOMITATO DE ORGANIZADO DE LA UNUJAJ KUNSIDOJ DE LA TUTMONDISMO**

**"LA ĜANTA MONDO"**

POŝTFAKO 0631, 37006 TOURS CEDEX (FRANCO)

komunikas al vi la temojn de la 5 tagoj en Tours (24-28 IV) mardon, la 24a: inaŭgura kunsido/merkredon: "fine, la paco?" ĵaŭdon: "harmoniiĝi la disvolviĝon?" vendredon: "protekti la biosferon" kaj sabaton, la 28an: "mondo por ĉiuj"


Ĉiutage: 8 publikaj prelegoj kaj vespere granda publika debato

SFS ricevis de Sro R. Picou (vidu ankaŭ la rubrikon pri Narbonne) longan dokumenton pri projekto nomita "Komuniklokoj Esperanto".

Pro manko de spaco ni reproduktas nur la resumon. Por pliaj detaloj, oni povas kontakti S-ron Picou ĉe E-95-8, Rue de l'Eglise 95520 Osny.

Ni celas starigi adresaron, kiu enhavos la nomojn kaj adresojn de profesiuloj kaj lokoj, kiuj uzas Esperanton (parole aŭ skribe), en ĉiuj landoj (komence, en Eŭropo). Tiu adresaro estos vendata ne nur en esperantistaj medioj, sed ankaŭ en librovendejoj, cele al la informado de la ĝenerala publiko. Ĝi estos ĉiujara.





Tarnkanjono

## LOZERO

### Franca departemento

Antaŭ kelkaj jaroj, se iu franco aŭdiŝ tiun nomon li demandis: "Ĉu tio estas rivero aŭ monto? Ĉu vere departemento? Kie?"

Tamen nun, post pligrandiĝo de la turismo, multaj francoj scias ke Lozero estas departemento el Langvedoka regiono. Kvankam parto el ĝi multe pli similas al la apuda Aŭvernjo. Agrabla regiono de aprilo ĝis oktobro por la turistoj. Speciale por la tendumantoj, kiuj ŝatas la piedajn promenojn sur montoj kaj en valoj aŭ la bicikladojn sur mal-larĝaj zigzagantaj vojoj, ĝuante tre belajn pitoreskajn pejzaĝojn.

Nia departemento konsistas el kvar malsimilaj regionoj:

Unua sudoriente, la skistoforma CEVENOJ. Ĝi etendiĝas inter la monto Lozero (1702m.) kaj la najbara departemento Gardo. Tiu granita monto Lozero nutras dum la somero la bovinarojn de la regiono kaj la ŝafarojn, transvenantajn el la sudo. Proksime de la fontoj de la rivero Tarno oni rikoltas dum septembro la bluajn mirtelojn.

Pli sude nur la kaŝtanoj kovras la krutajn flankojn de la montoj. Pro la mediteranea klimato kreskas fruktoj, legomoj, vitoj kaj morusarboj. Niaj avoj transportis surdorse la tero de la ĝardinetoj tien, nomataj "Banceloj". Ili ne estis multe pli grandaj ol naztuko. Nun restas nur kelkaj vilaĝoj, kie urbanoj riparas aŭ konstruis dome-tojn por libertempoj. Ruinoj sin kaŝas inter la iamaj vitejoj kaj kaŝ-tanarboj. Nur kaprinoj petole saltas sur la deklivoj. Ili donas al ni la fromaĝon "pelardon", tre ŝatata de la Cevenanoj.

La Cevenoj estas ankaŭ konata pro la lukto de la "camisards" (pro-testantoj), kontraŭ Ludoviko la 14a post 1689.

Dua okcidente, la kalkaj altebenaĵoj CAUSSES, situantaj inter la ri-veroj Lot kaj Tarn kun ĝia alfluo de la rivereto Jonte. Tie paŝtas la ŝafinoj, kies lakto donas la faman "Roquefort"-fromaĝon. La riveroj Tarn kaj Jonte fosis en la kalkon profundajn kanjonojn. La fama <Tarn-kanjono> estas ege pitoreska kaj ŝatata de la turistoj. Tiel bel-laj kaj mirindaj sur la altebenaĵoj estas la grotoj <Aven Armand> sur la <Causse Mejean> kaj <Dargilan> en la maldekstra valo de la Jonte. La klara akvo de la rivero invitas vin por bani aŭ remi en boatetoj.

Tria nordoriente, komencas la Regiono AUVERNJO per la altebenaĵo AUBRAC. Tie estas herbejoj inter la bazaltaj rokoj. De la 8a de majo ĝis la 18a de oktobro oni paŝtigas tie en vastaj areoj bovinarojn, kiuj estis transportitaj per kamionoj el la sudo. Oni melkas la bovinojn en parketoj antaŭ la "buron". En tiu malnova dometo la paŝtistoj kelkfoje ankoraŭ fabrikas la fromaĝon <fourme>.

La libertempaj fiŝistoj povas kapti trutojn en la laĝetoj kaj la ri-veretoj. Vintre ofte falas dika tavolo da neĝo. Tiam kelkfoje oni bezonas helikopteron por transporti malsanulon aŭ bezonaĵojn, kvankam la meza alteco ne superas 1400 metrojn.

Kvara nordoriente estas la akvorezervujo de 3 riverbasenoj de Fran-cio. Tie fontas la riveroj Allier, Lot kaj Tarn, alfluoj de Loire, Ga-ronne kaj Rhône.

Okcidente kuŝas la montoĉeno <Margeride>, lando de herbejoj, pinar-boj, riveretoj kaj vento. Ĝi gardas la memoron de la fama besto de Gé-vaudan, verŝajne granda lupoj, kiu mortigis kelkajn personojn kaj mul-tajn ŝafojn en la 18a jarcento. Gévaudan estas la norda parto de la de-partemento. Apude, ĝis la departemento "Ardèche", etendiĝas la altebe-naĵo <Palais du Roi> kaj la arbaro <Mercoire>. Ĉie floras la eriko kaj la genisto inter la granitaj rokegoj. En julio maturiĝas la fragoj kaj framboj.

Centre, preskaŭ ĉe la renkontopunkto de la kvar regionoj, kuŝas la ĉefurbo MENDE kun 12.000 enloĝantoj. La katedralo de Mende posedas du malsamajn turojn, ĉar ĝi estis detruita dum la religiaj militoj.

MARVEJOLS, la dua urbeto kun 6000 enloĝantoj, posedas la statuon de "la besto de Gévaudan". Plue staras en Marvejols statuo de la reĝo Hen-riko la kvaro. Li meritas ĝin, ĉar li rekonstruigis la urbon post la detruo en milita periodo.

La Lozero estas agrikultura departemento, ĝi preskaŭ ne havas indus-triojn. La Naturamantoj povas ĝui ĝian puran aeron, tendumi, migri, fiŝkapti, rikolti berojn kaj fungojn.

Precize dirite: tre taŭga loko por libertempoj.

M. Maurin (Francio)



Statuo de la besto de Gévaudan.

El "La Migranto"  
de Murto 90.



# ★ ESPERANTO ET PHILATÉLIE ★

Voir « La Philatélie Française »  
n° 422-423, pages 387-388

Sur la base du travail de Rudolf Burmeister publié en 1983, Richard Hirsch (Lambertstr. 12, D-6430 BAD HERSFELD) vient d'éditer le nouveau catalogue des marques postales espérantistes pour le compte de « Esperanto-Ligo Filatelista » (ELF/AREK).




Figure 1

Avec le catalogue des entiers postaux de Vladimir Vaña (voir cette même chronique de juin-juillet 1987) et celui des timbres-poste de Song Shengtan (voir la chronique de décembre 1988) le catalogue de R. Hirsch complète la documentation indispensable à tout collectionneur du thème espéranto.

Dans l'ordre alphabétique des pays et dans l'ordre chronologique au sein de chaque pays, la partie illustrée du catalogue présente toutes les marques postales espérantistes connues. C'est ainsi que j'ai pu classer rationnellement ma collection de Chine ce qui me permet de donner quelques précisions à nos lecteurs.




Figure 2

Dans la chronique de décembre 1986 je parlais de Cai Yuanpei ministre de l'Education de la République chinoise en 1912 et espérantiste. Deux timbres en son honneur ont été émis le 11 janvier 1988 (Figure 1) et, le même jour, un cachet bilingue chinois-espéranto a été utilisé à Changshu pour le 120<sup>e</sup> anniversaire de sa naissance.



Figure 3

Son existence n'ayant été signalée que fort longtemps après, j'en profite pour mentionner qu'en décembre 1986 je n'avais pas cité un quatrième cachet postal pour le 71<sup>e</sup> congrès universel d'espéranto qui venait de se dérouler à Pékin. Il s'agit d'un cachet postal commémoratif, en rouge vif ou en brun, utilisé à Changzhou le 26 juillet 1986. Sur un fond de globe terrestre l'illustration représente la place Tian An Men de Pékin maintenant connue du monde entier pour avoir été le théâtre des douloureux événements du printemps 1989 (Figure 2).

Pas moins de 60 marques postales commémoratives — peut-être plus — ont célébré en Chine le premier centenaire de l'espéranto. Toutes portent la date du 26 juillet 1987 (voir la chronique de novembre 1987). Celle du Tianjin est particulièrement originale (Figure 3). De couleur or métallisé l'impression semble avoir été obtenue à sec et à chaud.

En avril et en mai 1989 le 40<sup>e</sup> anniversaire de la libération des villes chinoises de Nanchang, Maanshan et Changshu a donné lieu à des oblitérations postales bilingues en chinois et en espéranto. A Nanchang une exposition philatélique était par ailleurs organisée pour commémorer la défaite japonaise, le retrait des troupes nipponnes ainsi que le repli de Chang Kai-shek sur Formose et la prise en main par Mao. Cette exposition nous a valu la première flamme postale chinoise à faire entrer dans nos albums (Figure 4).




Figure 4

Grâce à Christian Forgeron (Héricourt) et Laurent Bonnefoy (Besançon) que je remercie, dix ans après, nous pouvons donner connaissance de deux marques non encore cataloguées.

Tout collectionneur de notre thème sait que le 64<sup>e</sup> congrès universel d'espéranto, qui s'est déroulé à Lucerne en 1979, a vu l'émission d'un timbre commémoratif représentant le ballon à air chaud ESPERANTO HB-BEO.

Propriété des esperantistes suisses et du pilote, ce ballon a volé pour la première fois le 14 décembre 1976. De couleur jaune et blanc on retrouvera ce ballon lors de différentes manifestations de vols de ballons dont le premier championnat suisse de montgolfières à Porrentruy, le 19 novembre 1979, avec transport de courrier. L'affranchissement des plis à l'aide du timbre espérantiste était tout indiqué et le courrier transporté recevait l'empreinte d'une griffe de bord (Figure 5).

Toujours en 1979, et précisément le 26 juillet, cachet postal à l'occasion du premier jour du camp « Amikaro » à Warwick (Grande-Bretagne) (Figure 6).



Figure 5

Typiquement espéranto le mot « Amikaro » peut se traduire par « groupe d'amis » d'où le nom donné par les organisateurs aux campements scouts internationaux du comté de Warwickshire (centre de l'Angleterre).

Il serait intéressant de savoir si d'autres concentrations scouts « Amikaro » ont eu un cachet postal!




Figure 6

Rok - muziko

La disketo de Eurokka ĵus aperis kaj la federacia libroservo disponas pri stoketo (prezo:20F)  
Ankaŭ estas vendataj tri kasedoj, laŭ rekomendo de F. Martorell, fondinto de Eurokka:

- "Kajto" kun 16 titoloj. Broŝureto kun la vortoj de la kantoj en esperanto kaj klarigoj en multaj lingvoj
- Aaron: "Brazilumas esperante". Oni vere imagus sin en Brazilo!
- "Ora Team". La grupo TEAM estis jam tre konata en Ĉekoslovakio, kiam ĝi decidis ankaŭ kanti en Esperanto por esti komprenata eksterlande.

Ciu el la kasedoj kostas inter 60 kaj 70F. \* La aĉeto de kasedo helpas al la presigo de aliaj.

\*\*\*\*\*

